# Horizon-TAAL

Jaargang 48 - nummer 283

november-december 2016



www.esperanto.be

Met steun van de Vlaamse Gemeenschap

**De volgende vergadering van de Buitengewone Algemene Vergadering (voormiddag) en van de bestuursvergdering van FEL (namiddag) gaan door op zaterdag 10 december.**

**Daarop komen volgende onderwerpen zeker aan bod:**

- **Goedkeuring statuten na opmerkingen van Vlaams Studie- en Documentatiecentrum vzw's**
- **Begroting 2017**
- **Nieuwe behuizing**

**Plaats zal nog zo vlug mogelijk meegedeeld worden**


**Tweemaandelijks tijdschrift, uitgegeven door de Vlaamse Esperantobond v.z.w.**
48ste jaargang - november-december 2016
Verschijnt de 1ste van elke oneven maand
Overname van artikelen is vrij op voorwaarde dat de bron wordt vermeld en een exemplaar aan de redactie wordt gestuurd

**Redactie en administratie**: Vlaamse Esperantobond v.z.w. - Lange Beeldekenstraat 169, 2070 Antwerpen - tel.: 03 / 234 34 00 - Epost: horizon.taal@esperanto.be webstek: http://www.esperanto.be/fel/nl

**Abonnementen**: 25,00 EURO

**Rekeningen**: t.n.v. Vlaamse Esperantobond, Antwerpen
KBC IBAN BE31 4025 5105 3155, BIC: KREDBEBB
de Post IBAN BE66 0000 2653 3843, BIC: BPOTBEB1

**Redactie**: vakas

**Tekstopmaak**: Eriko D'Hondt

**Medewerkers**: Marc Cuffez, Ivo Durwael, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, André Ruysschaert, Jean-Pierre Van den Daele, Emiel Van Damme, Kris Panis, Mireille Storms, Ivo Vercammen e.a.

**Verantwoordelijke uitgever**: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, B-2070 Antwerpen, Belgio



**Advertentietarieven:** (alle prijzen zijn in euro)

* Inlassing van 3x dezelfde advertentie van een drukklaar geleverd exemplaar

Btw-tarief van 21% op deze tarieven.

| | 1-malig | 3-malig* | 6-malig* |
|---|---|---|---|
| formaat 1/1 | 257 | 625 | 1000 |
| formaat 1/2 | 150 | 375 | 600 |
| formaat 1/3 | 110 | 275 | 440 |
| formaat 1/4 | 80 | 200 | 320 |
| formaat 1/8 | 55 | 140 | 220 |
| formaat 1/12 | 30 | 75 | 120 |




## TWEEMAAL ERKENNING VOOR JEAN CODJO

De stichting Grabowski heeft als doel de Esperantocultuur te steunen. Tijdens het wereldcongres in Nitra, juli 2016, kende de jury aan Jean Codjo de premie toe voor uitzonderlijke culturele actie. De motivering is: "*U verdient deze premie voor uw bijdrage aan de Esperantoliteratuur, meer in het bijzonder voor uw opmerkelijke verrijking van de interculturele dialoog.*"




Bij dezen verwijst de jury onder meer naar de 3 verhalen van Jean Codjo die uitgegeven werden bij FEL.

Een tweede waardering van de activiteiten van Jean blijkt uit de toekenning van een Diploma voor Buitengewone Actie. Motivering: de *langjarige volgehouden actie voor Esperanto in Afrika*.
In de Vlaamse Esperantobond denken wij daarbij aan de Beninese lagere school die Jean opgericht heeft en nog steeds begeleidt. Deze dorpsschool kreeg, als dank voor de grote steun, de naam van de Antwerpse esperantist en mecenas Jules Verstraeten. Naast het gewone programma krijgen de kinderen ook les in het Esperanto.







**Nieuwe bijzondere collectie bij Erfgoedbibliotheek Hendrik Conscience**

Op 30 mei ll. keurde de Antwerpse Gemeenteraad een **Samenwerkingsovereenkomst** goed tussen enerzijds *Erfgoedbibliotheek Hendrik Conscience* (EHC) en anderzijds de *Vlaamse Esperantobond vzw* (VEB). Daarbij staat deze laatste het grootste deel van haar boeken af aan de EHC om bewaard te blijven als bijzondere collectie onder de benaming "Flandra EsperantoBiblioteko" en om onder de gebruikelijke voorwaarden ter beschikking gesteld te worden van wetenschappers en onderzoekers, naast de gewone geïnteresseerden.

Aanleiding van de overdracht is het nakend hersitueren van het Esperantohuis van Frankrijklei 140 naar de Lange Beeldekensstraat , 169(*Tailors Armando*). De verhuis vindt plaats in de komende maanden. Door de voortaan kleinere behuizing is er minder ruimte voor een eigen omvangrijke bibliotheek. De VEB is evenwel van oordeel dat, dankzij de schenking aan EHC, een hoogstaand en meer divers lezerspubliek zal kunnen bereikt worden.

In deze nieuwe locatie hoopt de VEB ook, door letterlijk en figuurlijk haar toegangsdrempel te verlagen, binnenkort vlotter en frequenter voeling te krijgen met een verscheiden taalminnend publiek. Het zal ook voor ieder mogelijk zijn, er zich documentatie en boeken aan te schaffen en er een praatje te komen maken over Esperanto en de taalproblematiek in 't algemeen.

# FLANDRA ESPERANTO BIBLIOTEKO KAJ HEREDAĴBIBLIOTEKO HENDRIK CONSCIENCE

## Ekrealiĝis Flandra Esperanto-Biblioteko !

Kaŭze de la venonta transloĝiĝo al nova Esperanto-domo, havanta malpli da spaco por propra ampleksa biblioteko, solvo estis serĉata por taŭge kaj daŭre loĝigi la malgrandan sed interesan librotrezoron de Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Jam okaze de la unuaj kontaktoj kun la sekciestro pri la Donacoj de Erfgoedbibliotheek Hendrik Conscience (EHC, Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience), s-ro Dirk Van Duyse, ekestiĝis tute klare ke donaco de la FEL-biblioteko al EHC alportus konsiderindajn avantaĝojn por nia asocio.

## Avantaĝoj de donaco de la FEL-biblioteko

La sperta kaj science taŭga konservado de sufiĉe ampleksa librokolekto estas ege multekosta afero. Se la okazo sin prezentas, estas finance kaj praktike pli avantaĝe donaci la kolekton, ol konservi ĝin mem. Fakte nur la socio kapablas subteni daŭran konservadon kaj mastrumadon de valora biblioteko. Klare, bone pripensita donaco estu tiu kiu prezentas: (1) certecon rilate al la daŭra konservado; (2) daŭran eblecon de facila konsulto de la dokumentoj. Koncerne EHC, ambaŭ kondiĉoj plenumiĝas.
Kromaj avantaĝoj estas ekzemple (3) integriĝo en sama katalogo de EHC kune kun aliaj gravaj artikoloj el flandraj sciencaj bibliotekoj; (4) liberigo de ĉiuj praktikaj, financaj kaj teĥnikaj zorgetoj por la Esperanto-kolekto kiel ekzemple por la prizorgado de retejo; (5) esti agnoskita kiel aparta kolekto nomita Flandra Esperanto-Biblioteko kiu provizas per “elpendaĵo” por Esperanto pere de la retpaĝaro de EHC, ofte konsultita de altnivela kaj esplorema publiko; (6) senpaga skanado de dokumentoj en la legejo de EHC, kaj aliaj facilaĵoj; (7) ebleco (por Esperantistoj ekzemple) estiĝi volontula kunlaboranto de EHC pere de individua volontulkontrakto; (8) eblecо de estonta kompletigo de la aparta kolekto pere de pluaj donacoj, kiel kondiĉigita en kunlaborinterkonsento inter EHC kaj FEL; (9) la reta konekto de EHC al la fama retpaĝaro WorldCat per kiu la ĉeesto de la koncernaj Esperanto-publikigaĵoj en EHC estas konebla tra la mondo.

## Irado de la proceduro

La 27-an de februaro 2016, la Ĝenerala Kunveno de FEL unuanime aprobis kunlaborinterkonsenton, en kiu la kondiĉoj de la koncerna donaco estas priskribitaj. La aprobo unuflanke de la Kolegio de Urbestro kaj Skabenoj kaj aliflanke de la Antverpena Komunuma Konsilantaro okazis respektive la 4-an de majo 2016 kaj la 30-an de majo 2016. Finfine la Kunlaborinterkonsento estis subskribata fare de la prezidanto kaj la sekretario de FEL la 24-an de septembro 2016 en la fama Nottebohm-salono de EHC je la ĉeesto de direktoro S-ino An Renard kaj de sekciestro S-ro Dirk Van Duyse ekestiĝis.

## Leĝa bazo de EHC

EHC estas konservad- aŭ heredaĵbiblioteko, freŝdata flandra nocio ankrumita en la flandra leĝaro. La termino “konservadbiblioteko” estas unue precize priskribita fare de Ludo Simons en 2005. Poste oni estis preferonta la terminon “heredaĵbiblioteko”. En 2005 impulse de la Antverpena Urba Biblioteko (nuntempe: EHC) la *Overlegplatform Bewaarbibliotheken Vlaanderen* (Interkonsiliĝplatformo Konservadbibliotekoj) kreiĝis. Tiu kunlaborplatformo, poste nomita *Vlaamse Erfgoedbibliotheek* (Flandra Heredaĵbiblioteko), celis la starigon de la konservad- kaj heredaĵbibliotek-sektoron. Tiu rezultis en la inkludon de Flandra Heredaĵbiblioteko en la Heredaĵdekreto de 2008. La Asocio sen Profitcelo estis starigata en septembro 2008 kaj oficiale estis prezentata en junio 2010. Nur ekde freŝdate konservad- aŭ heredaĵbibliotekoj ekzistas en Flandrujo, surbaze de la Heredaĵdekreto.
La *Vlaamse Erfgoedbibliotheek vzw* konstituas retejon de ses bibliotekoj: EHC, Universitata Biblioteko Antverpeno, Publika Biblioteko Bruĝo, Universitata Biblioteko Gento, Universitata Biblioteka Loveno, Provinca Biblioteko Limburgo (en Haselto). Ankaŭ kelkaj aliaj flandraj bibliotekoj posedas heredaĵkolektojn.
La taskoj de Flandra Heredaĵbiblioteko estis precizigataj per artikolo 78 de la Flandra Kultura Heredaĵdekreto de la 6-a de julio 2012.

## Pri kio okupas sin EHC?

La ekzistkialo de EHC estas, koncize, la kolektado, konservado kaj disponigado de ĉiuj eblaj publikigaĵoj kiuj karakterizas kulturon kaj homon en Flandrujo, celante pluan esploradon kaj studadon de tiuj fontoj. EHC estas scienca instituto, aŭ almenaŭ instituto kiu progresigis la sciencan esploradon. EHC profiligis sin precipe en la kampo de la nederlandlingva literaturo kaj flandra kulturo, arto, historio…, sed ĝi konsideras sian taskon larĝskale: ankaŭ la flandra naturo, vivmedio, kaj la multaj facetoj kiuj determinas la vivon de la flandro, estas konsiderataj. Kulturo, arto, literaturo… ne estas por la sciencisto izolitaj akademiaj disciplinoj, ili estas interplektitaj kun la ĉiutaga vivo, la socio, la medio. Tial la kolektoprofilo de EHC ne estas mallarĝa, kontraŭe.

## Kial Esperanto trovas sian hejmon en EHC?

La normo por la jes aŭ ne akcepto de publikigaĵo en EHC estas ties jes aŭ ne ekzistanta rilato kun la flandraj kulturo kaj homo. Deviado de tiu principo ne estas ebla. Ĉar EHC estas “konservadbiblioteko”, t.e. publikigaĵo kiu tie eniras, estonte ne povas eliri. La elekto de la akceptotaj dokumentoj do estas severa.
Kulturtemaj publikigaĵoj realigitaj fare de flandroj, sendepende de la lingvo uzita, kiel aŭtoro, tradukisto aŭ eldonisto, ĉiam rajtas spaceton en EHC.
Kiel do estas eble ke aliaj Esperanto-publikigaĵoj, kiuj por granda parto tute ne rilatas al la flandra heredaĵo, tamen eniros la heredaĵbibliotekon? Estas kaŭze de la senpera rilato al la flandraj kulturo kaj homo ! Efektive, ekde la estiĝo de Esperanto ĉiam estas estintaj flandroj kiuj lernis tiun lingvon, kiuj dediĉis sin al ĝi, kuniĝis sin ĉirkaŭe, publikigis, tradukis, eldonis, propagandis, prizorgis… Estas danke al la laborema diligenteco por la Internacia Lingvo de generacioj de flandroj ke ni rajtas spaceton en tiu flandra kulturtemplo kiu estas EHC.
La rezonado estas ke la flandra Esperantisto interesiĝis kaj interesiĝas por multnombraj publikigaĵoj de fremdlanda origino, kaj ke el scienca vidpunkto oni ne povas serioze pristudi la flandran Esperantiston sen samtempa pristudado de tiuj eksterlandaj verkoj. Tial EHC prijuĝas publikigaĵojn ne nur surbaze de sia mallarĝsenca kolektoprofilo, tamen oni ankaŭ konsideras “apartajn kolektojn”. Tiuj ĉi permesas akcepti ankaŭ verkojn ekster la kolektoprofilo de EHC, kondiĉe ke la “aparta kolekto” kiel tutaĵo rilatas al la flandraj kulturo kaj homo. Tio efektiviĝas en la kazo de la nova aparta kolekto Flandra Esperanto-Biblioteko…

## Kelkaj praktikaj informoj

En la retpaĝaro de EHC oni trovas la necesajn informojn. La legejo troviĝas per la enirejo je la Korte Nieuwstraat. Registri sin kostas jare 3 eŭrojn, kaj valoras ankaŭ por la ordinaraj antverpenaj publikaj bibliotekoj. La legejo prezentas studejon kaj silentejon kun senpaga interreto por 76 personoj.
Inter 15 septembro kaj 15 junio la legejo estas alirebla de 9-18 h, lunde, marde kaj ĵaŭde; merkrede de 9-20 h;



*De voorzitter van de Vlaamse Esperantobond, Ivo Vercammen, ondertekent het protocol met EHC.*

vendrede de 9-17 h kaj sabate de 9-13 h. Somere la legejo estas alirebla de lundo ĝis vendredo, ĉiufoje de 9-17 h.
Antaŭe al vizito oni povas mendi la deziratajn dokumentojn helpe de la cifereca katalogo. Eleksterne oni rajtas mendi ĉiutage po 7 verkoj. En la legejo oni rajtas mendi ĉiutage po 30 verkoj. La menditaj verkoj restas dum 2 semajnoj je la giĉeto de la legejo, kalkulite ekde la elektita livertempo.
Oni povas senpage ciferecigi dokumentojn per libroskanilo kaj konservi la skanaĵojn helpe de USB-poŝmemorilo. Nigra-blanka kopio kostas 0,15 eŭro/ paĝo. Skanado de multvaloraj, tre grandaj aŭ difektitaj verkoj ne estas permesata. Dokumentoj,kiuj dependas ankoraŭ de la aŭtora rajto, oni povas kopii aŭ skani nur por severe limigita persona uzado.

### Irado de la okupoj. Kaj plue…?

Ni estas nur je la komenco de la realigo de nia "Flandra Esperanto-Biblioteko". Estis bezonataj ĉirkaŭ 40 labortagoj, dum deko da monatoj, por selekti el pli ol 4000 libroj, tiujn verkojn taŭgajn por eniri EHC, kaj tiujn destinatajn por la nova Esperanto-domo. Ĉe tio, por ĉiu dokumento la cifereca katalogo de EHC estis konsultata, ofte ankaŭ tiu de la FEL-biblioteko. Por eviti superfluan laboron, EHC estis petinta al ni ne donaci dokumentojn jam ĉeestantajn en la Heredaĵbiblioteko. Escepte de limigita nombro da konsultlibroj, dum la aljuĝo absoluta prioritato estis donata al EHC, kiu fakte estiĝas la nova FEL-studbiblioteko kaj kiu estu do tiom kompleta kiom ebla. Se ĉeestis nur unu ekzemplero de publikigaĵo, ĝi do estis aljuĝata al EHC. De duoblaĵoj la plej sendifekta ekzemplero estis atribuata al EHC, la malpli sendifekta al la nova Esperanto-domo. Danke al la ampleksa freŝdata donaco de karmemora José Augusto Pinto de Sousa, la FEL-biblioteko tamen povis konservi sufiĉe grandan diversecon de verkoj, estantaj la duoblaĵoj, tiel ke novuloj kaj progresintoj ankoraŭ povas profiti de deca kvanto da diverstemaj libroj sen devige tuja vizito al EHC.
La donacitaj publikigaĵoj unue devas esti aldonitaj al la cifereca katalogo antaŭ ol esti serĉeblaj kaj repostuleblaj. Normale estas atentoperiodo de almenaŭ tri jaroj antaŭ ol oni komencas la j de donacitaj publikigaĵo. Efektive estas konsiderinda katalogado-nefaritaĵo ĉe EHC kaŭzita de ŝparoj pri personaro. Escepte EHC permesas fari tiun laboron helpe de volontulo, ĉi-kaze la subskribinto. Tiele la aparta kolekto efektive povos esti realigita post ne trolonge. La regula ĉeesto de volontulkontrakta kunlaboranto-Esperantisto sendube ankaŭ kunhelpos por konatigi la facilaĵojn kiuj EHC povas prezenti por niaj membroj. Ni ankaŭ intencas konatigi en Horizon-Taal la bibliografiajn riĉecojn de Flandra Esperanto-Biblioteko, kaj ĝenerale kontribui por progresigi la legadon kaj studadon de la Esperanto-heredaĵo.
Intertempe la ekzisto de la nova aparta kolekto estas indikita en la retpaĝaro de EHC, kaj la katalogado ekrealiĝis.
Kvankam la pezocentro de la t.n. "Dokumentarcentro" de FEL nun estos translokita al EHC, la reorganizo de la postrestanta FEL-biblioteketo postulos kaj akiros nian atenton. Ĉiam ĉeestos sufiĉe granda diverseco de publikigaĵoj en la Lange Beeldekensstraat, nepre utila kaj sufiĉa por unua konatiĝo kun la riĉa kaj diversa Esperanto-literaturo.

### Bibliografio


*Simons, Ludo 2005: Bewaarbibliotheken in Vlaanderen. Ideeën voor een beleid ter zake. Culturele Biografie Vlaanderen, Brussel
*Gemeenteraad Antwerpen, zitting van 30 mei 2016: Cultuur, Musea en Erfgoed, Erfgoedbibliotheek Hendrik Conscience, Samenwerkingsovereenkomst Vlaamse Esperantobond v.z.w., 6 blz.
*Flandra Kultura Heredaĵdekreto de la 6-an de julio 2012


Cyreen Knockaert
volontula bibliotekisto FEL
volontula kunlaboranto EHC

## HEREDAĴBIBLIOTEKO HENDRIK CONSCIENCE

La Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience (Erfgoedbibliotheek Hendrik Conscience) estas la heredaĵbiblioteko de la urbo Antverpeno. Ĝi estas nomita laŭ la flandra populara aŭtoro Hendrik Conscience [Konsjans], kies statuo troviĝas antaŭ la biblioteko. Publikigaĵo kiu estas akceptita en la kolekto de la konservadbiblioteko normale por ĉiam restas disponebla (1).
La origino de la Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience, kiu ĝis en 2008 tutordinare nomiĝis "Urba Biblioteko", retroiras al 1481. La kolekto enhavas pli ol miliFono da dokumentoj. La prioritataj kolektosferoj estas la nederlandlingva literaturo, la historio de la Malaltaj Landoj, malnovaj presaĵoj (libroj presitaj antaŭ 1830), flandra popolkulturo, arto en la Malaltaj Landoj kaj antverpenaĵoj.

### 1. Historio

La origino de la Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience retroiras al la mezo de la 15-a jarcento, kiam Willem Pauwels donacis sian kolekton al la urbo. Tra la jarcentoj la kolekto daŭre alkreskis. Nur ekde la 19-a jarcento la tiama Urba Biblioteko travivis realan floradon. Nuntempe la Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience posedas riĉan kolekton kaj ĝi estas konsultata de vasta kaj diversa publiko.



*Ook Nicky Janssen, secretaris van de Vlaamse Esperantobond, moest het protocol ondertekenen.*

#### *1.1. Malnova Reĝimo*

En 1481 la urba advokato Willem Pauwels donacis sian kolekton de 41 libroj al la urbo Antverpeno, por apogi la sekretariojn kaj oficistojn de la magistrato ĉe ilia laboro. Tiel li unue kontribuis al tio kio iun tagon estiĝus la Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience. La biblioteko estis aranĝata en 1505 en la urba domo. Tio kio ankoraŭ restis en 1576 de tiuj 41 libroj, definitive perdiĝis en la urbdoma incendio dum la Hispana Furio, kiam la hispana militistaro murdante trairis la urbon.
Sufiĉe rapide la urbo decidis reestabli sian bibliotekon. Christoffel Plantijn kaj siaj sekvantoj donacis ekzempleron de ĉiu libro kiun ili estis presintaj (inter alie la Biblia Polyglotta kaj la Opticorum libri VI de Franciscus Aguilonius). En 1594 tiu nova biblioteko estis loĝigata en la antaŭan ĉambron de la burĝogardistaro en la urba domo, la Camer van de Librarye (ĉambro de la biblioteko).
En 1604 la episkopo Johannes Miraeus fondis la Antverpenan seminarion kiu devis garantii la edukon de la klerikoj. Jam rapide sentiĝis la bezono al propra biblioteko. Johannes Miraeus nomumis sian erudician nevon Aubertus Miraeus kiel bibliotekiston. Sub ties administracio estiĝis brilanta humanisma kolekto, helpe de donacoj de sciencistoj, riĉaj burĝoj kaj libropresistoj. En 1609 la kanonikaro ekintertraktis kun la urba estraro por kunigi ambaŭ bibliotekojn. Atendante realan kunigadon Miraeus inventaris la kanonikaran bibliotekon. En tiu Bibliothecae Antverpianae Primordia li menciis 356 verkojn, inter aliaj 32 manuskriptojn. Ekde 1617 ambaŭ bibliotekoj estis kunigataj en ĉambro de la seminario.
Post la Paco de Münster, kaŭze de la barado de la Skeldo kaj la malkreskinta komerca vivo, estiĝis spaco en la Komerca borsejo. La urba estraro decidas stoki sian bibliotekon en la supran galerion de la borsejo. Post tio sekvas tridek jaroj da malatento, neglekto kaj ŝtelado, ĝis en 1677 kiam la urba sekretario denove atentis la sorton de la libroj kaj inventaris ilin. En 1687 la libroj estis loĝigataj en la tiel nomatan Pestkamer (ĉambro de la pesto) de la urba domo, kie antaŭe la magistrato kaj la urbaj kuracistoj kaj la pestomajstro interkonsiliĝis pri la farendaj aranĝoj por kontraŭstari la epidemiojn.

#### *1.2. Franca okupado*

Dum la 18-a jarcento ankaŭ la Urba Biblioteko ne eskapis el la ĝenerala ekonomia malvigleco en kiu vivis Antverpeno. Nur en 1795 tio ŝanĝiĝis. La franca okupinto establis en Antverpeno Centran Lernejon, kun biblioteko. Tiu kolekto precipe enhavis verkojn kiuj devenis de abolitaj monaĥejoj kaj monaĥejaj bibliotekoj. Jam en 1802 la Centra Lernejo estis fermata. Multaj libroj denove estis restituataj al la originaj proprietuloj, sed multaj verkoj ni ankoraŭ retrovas en la malnova fonduso de la nuntempa Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience. Ekde 1805 la biblioteko estis malfermata por la publiko: legejo estis aranĝata kie la burĝoj povis konsulti la kolekton surloke.

#### *1.3. Deknaŭa jarcento*

Por la Urba Biblioteko la deknaŭa jarcento estiĝis floradepoko. La bibliotekistoj Frans-Hendrik Mertens kaj Constant-Jacob Hansen organize kaj enhave influis la Heredaĵbibliotekon Hendrik Conscience kiel ni ko-

nas ĝin nuntempe. En 1834 Mertens estis enoficigata kiel bibliotekiston. Li denove klasifikis la librojn kaj publikigis presitan katalogon. Li starigis la bazon de impona kolekto “Nederlanda literaturo” pri kiu la Heredaĵbiblioteko nuntempe disponas kaj kiu ĝis nun estas la precipa temo de la nuntempa kolektadpolitiko. Dum siaj lastaj vivojaroj li fasonis la fondon kaj la elkreskon de la Popolbiblioteko, la posta Publika Biblioteko. En 1865 la urbo Antverpeno elektis du biblioteko-tipojn: la *Popolbiblioteko* kun hodiaŭaj libroj unuflanke, la *Urba Biblioteko* kun konservadkolekto aliflanke.

La daŭra alkresko kaj de la Urba kaj de la Popolbibliotekoj tamen kondukis al ege mankanta spaco en la urba domo. En 1879 la urbo Antverpeno tial aĉetis Sodaliteit el la 17-a jarcento, situinta en la Placo de la Jezuitoj kontraŭe de la Preĝejo Karolo Boromeo. Post ĝisfunda alikonstruo, la ĉirkaŭ 43 000 libroj de la tiama Urba Biblioteko kune kun la 20 000 verkoj de la Popolbiblioteko estis transportataj al la novaj lokaloj en 1883. La oficiala malfermo estis akompanata de granda popola festo, dum kiu la statuo de Hendrik Conscience estis solene inaŭgurata. La Placo de la Jezuitoj estis rebaptata al Placo Hendrik Conscience. La manko de spaco tamen restis granda problemo, kaj jam en 1895 la Popolbiblioteko (la nuntempa Publika Biblioteko) translokiĝis al establo en la Blindestraat.

### *1.4. Dudeka jarcento*

Kiam en 1905 la heredintoj de la bibliofilo Gustave van Havre volis aŭkciigi lian ampleksan libraron en Amsterdamo, la precipa bibliotekisto Frans Gittens kaj Max Rooses, konservisto de la *Muzeo Plantin-Moretus*, sin turnis al la Urba Estraro, la gazetaro kaj diversaj mecenatoj. Danke al la apogo de speciala Donaco-fonduso, kvarono de la kolekto povis esti aĉetata. Ankoraŭ nuntempe tiu kolekto van Havre estas grava parto de la biblioteka posedaĵo. La incidento kondukis al establo de la *Permanenta Donaco-fonduso por la Urba Biblioteko kaj la Muzeo Plantin-Moretus*, la nuntempa Dotatiefonds voor Boek & Letteren [Donaco-fonduso por Libro & Literaturo]. Tiu mecenata asocio ankoraŭ ĉiam estas regula donacanto de gravaj akiraĵoj. Kiel konservadbiblioteko la Antverpena Urba Biblioteko kontinue luktis kontraŭ la manko de spaco. En 1930 kaj 1990 ĝisfundaj adaptaĵaj kaj plivastigaj laboroj estis plenumataj. Kun tio la infrastrukturo ĉiufoje estis optimumigata funkcie de la komforto de la uzanto kaj de la konservado de ĉiam alkreskanta, grandvalora kolekto. En 1980 la kolektokampoj formale estis konfirmataj de la Komunuma Konsilantaro. La disponeblaj budĝetoj prefere estis elspezataj por la plivastigo de tiuj kolektokampoj. Ekde tiam la vojoj de la Publika kaj de la Urba Bibliotekoj definitive apartiĝis.

Ĉe la ŝanĝiĝo de la jarcento la Urba Biblioteko estis



*De voorzitter Ivo Vercammen dankt iedereen in naam van de Vlaamse Esperantobond*



**Nikolai KURZENS** (1910-1959) estis latva esperantisto kaj verkisto. Profesie li estis ŝtatoficisto. Redaktoro de 'Ondo de Daŭgava' (1934), kunlaborinto de 'Literatura mondo' kaj 'Norda literaturo'. Li ankaŭ kontribuis al la esperantlingva poem-antologio 'Dekdu poetoj' (1934).

| NECESAS | *NODIG IS* |
|---|---|
| 1 Necesas io granda, io tia,<br>ke ni ne devu pro la vivo honti,<br>ke ni fiere povu poste montri:<br>ne estis tamen vana vojo nia. | *1 Nodig is iets groots, iets zodanig,<br>dat we ons niet moeten om het leven schamen,<br>dat we later fier mogen tonen:<br>toch was hij niet vergeefs, de reis van ons.* |
| 5 En ĉarma bel', en varmo idilia<br>la Grandon vane volus ni renkonti;<br>necesas alte super tio monti ---<br>en venta fajf', en malkvieto kria. | *5 In bekoorlijke schoonheid, in idyllische warmte<br>zouden we graag het Grote ontmoeten - vergeefs:<br>nodig is hoog boven dat uit te steken ---<br>in windgefluit, in bulderende onrust.* |
| 9 Necesas ĵeti nin al fajr' infera,<br>por esti io pli, ol vermo tera,<br>rampanta al la fin' kun laca treno. | *9 Nodig is ons te werpen in hels vuur<br>om iets méér te zijn dan een aardse worm<br>kruipend naar het einde, met uitgeput gesleep.* |
| 12 Necesas plor' de malespero muta,<br>necesas hor' ekstaze fajrosputa,<br>kaj paradiz' necesas kaj geheno ! | *12 Nodig is te wenen van sprakeloze wanhoop,<br>Nodig is het uur dat extatisch vuur uitbraakt,<br>en een paradijs is nodig en Gehenna !* |

**PRI LA POEMO**

**La titolo. Necesas**

Jen titolo iom impresa°. *indrukwekkend*
Tuj la leganto sin demandas pri kio temas.
Tuj li nekonscie sentas en tiu vorto …
neceson°, mankon, devigon°, devon°. *noodzakelijkheid; verplichting; plicht*

**Versoj 1-2. Necesas io granda, io tia,**
**ke ni ne devu pro la vivo honti,**

Ĉu temus pri io gravega°? *zeer ernstig, belangrijk*
Sendube°! Ĉiakaze grava por la parolanto. *ongetwijfeld*
Kia povus esti tiu 'io granda'?
Verŝajne io ege bela, ege impona°. *indruk makend*
Kia estus do la vivo sen tiu 'io'?
Ĝi estus verŝajne ege banala, eĉ eble netolereble° banala. *onverdraaglijk*
Ĉu ne povus ekzisti io granda, pri kio oni devus honti?
Milito°, krimo°, perfido°. *oorlog; misdaad; verraad*
sed tiaj aferoj ne devas esti necese grandaj por esti kaŭzo de honto. La grandeco ne estas garantio por kvalito.
Kiu ideo esprimiĝas en tiuj unuaj versoj?
Eble ke normala vivo ne estas sufiĉe bona.
En kia psika stato estas iu, kiu proklamas tian opinion?
Li estas ege entuziasma, eĉ tro... ekscitita°. *opgewonden*

**Verso 3. ke ni fiere povu poste montri:**

Do temas pri io, kio devas poste inspiri kion?
Certe admiron, ĉar sen tio, ni devus....honti.
Temas do efektive pri io ege grava.
Kia afero povus ludi tian gravan rolon?
Mi dirus, ke tio dependas de ĉiu persone !
Kiu sento aŭ deziro esprimiĝas en tiu verso?
La fiereco, la deziro esti admirataj.
Poste = ?
En momentoj, kiam oni rememoras sian vivon.

**Verso 4. ne estis tamen vana vojo nia.**

Kion esprimas la vortoj 'vojo nia'?
La vivo de ĉiuj homoj.
Kia estus vana vojo?
Vojo, kiu kondukas al nenio, kiu iras nenien.
Do tute neutila, sekve° evitinda vojo. *bijgevolg*
Kia estus ies vivo, kiu estus estinta° vana? *zou geweest zijn*
Jen malfacila demando.
Ĉio dependas de la koncernato ! Kaj krome, kiu povus decidi pri tia taksado°? *inschatting*

obond.

**Verso 5. En ĉarma bel', en varmo idilia**
Kion sugestas tiu verso?
Ni estas kondukataj al paradiza situacio.
Kio estas idilio?
Trankvila kaj naiva amo.
Kie situas tia paradizo?
Verŝajne en iu revo de la poeto?
Kia ni imagu 'idilian varmon'?
Tia, ke ĝi sugestu nur...
agrablaĵojn korpajn aŭ spiritajn.

**Verso 6. la Grandon vane volus ni renkonti;**
Kion oni imagu sub tiu Grando kun majusklo°? *hoofdletter*
Ion, kio estas multe pli ol nia kutima° vivo. *gewone*
Kio estas 'vane voli ion'?
Voli ion sen rezulto, voli senutile°. *nutteloos*
Kiaj homoj volus fari tian renkonton?
Ĉu homoj kun ia idealo? kun tro da revoj? aŭ tro da ambicio? da orgojlo°? *hoogmoed*
Ĉiaokaze homoj, kiuj ne kontentiĝas pri eta banala vivaĉo°. *slecht leven*

**Verso 7. necesas alte super tio monti ---**
Super tio = ?
super la ĉarma belo, la varmo idilia.
Alivorte, ni devas forlasi nian nunan nivelon, esti pli aŭdacaj°. *vermetel*

**Verso 8. en venta fajf', en malkvieto kria.**
Kiel imagi 'en venta fajf' ?
en situacio sen protektado
kaj 'malkvieto kria'?
Tiom granda malkvieto, ke oni krius por helpo.
Kie supozeble° estas tiaj teruraj lokoj? *vermoedelijk*
Certe tiaj situacioj povas okazi dum° ies ajn° vivo. *tijdens* *om't even wiens*
(Notindas la simetria konstruo de la verso).

**Verso 9 Necesas ĵeti nin al fajr' infera,**
Kio kaj kie povus esti tiu infera fajro?
Supozeble ie ajn, kie la vivo estus ege malfacila? Kaj ne temas necese pri ia loko, sed krome ankaŭ pri infera situacio en la vivo.

**Versoj 10-11. por esti io pli, ol vermo tera,**
**rampanta al la fin' kun laca treno.**
Kiel li iam povus esti tia?
Li antaŭvidas por si mem tian estontecon de vermo tera, se li ne sin ĵetas en tiun inferan fajron.
Kia pensado estas nun rivelata° ? *onthuld*
Ĉiu devas morti. Sed estas pli bone distingiĝi meze de° la aliaj ol resti banala vivanto sur ĉi tiu tero. *te midden van*

**Verso 12. Necesas plor' de malespero muta,**
Ĉu eble li volas esti tragika?
Certe! Neniu mezo°, do ankaŭ ne “ordinara” malespero. Li volas esprimi klare per ploro, per gesto, sian malesperon, elreviĝon aŭ seniluziiĝon. *middelmaat*
Eble realisto demandos, kial tiaj korpaj aŭ spiritaj aferoj vere necesus?
Se ni volas renkonti la Grandon kun majusklo, pri kiu temas en verso 6, tiam eble ili estus bona mempreparado.

**Verso 13. necesas hor' ekstaze fajrosputa,**
Jen tute alia spirita stato. Sed denove neniu “kutima” feliĉo.
Ĉu oni alterne flugu aŭ falu de unu stato al alia?
Kio ĉi-kaze anstataŭas° la malesperon de la antaŭa verso? *vervangen*
Io, kio devas eksplodi. Kia eksterordinara io estus tio?

**Verso 14. kaj paradiz' necesas kaj geheno !**
Geheno = infero (derivita de la hebrea nomo de la Valo de Hinnom, sude de Jerusalemo).

**Ĝenerala impreso pri la soneto**
Jen certe iom konsterna° soneto. *verbijsterend*
Ekde la unua strofo la leganto sentas sin admonata° vivi kun pasio, ĉar tiam li poste povos prave° fieri. *aangespoord* *terecht*
Banala vivo ne estas ege admirinda, sed la deziro pri grandeco povas maltrankviligi° multajn ! *verontrusten*

-----

**PLIE PRI IUJ VORTOJ**
Necesas (la titolo)
***1.La verbo 'necesi'.***
Jen vorto kiu esprimas opinion. Tuj leviĝas aliaj demandoj: kio? por kio? kial? ktp.
Kio necesas por vivi ? Kroma demando ege grava: por vivi aŭ por bone vivi? Denove miloj da respondoj eblas.

Kio necesas por sukcesi en ekzameno?
Kial necesas sin ekzerci por lerni lingvon?
Jen pripensinda zamenhofaĵo tiuteme:
**La prudento° necesigas nin venki° la naturon.** *verstand* *overwinnen*
Sed oni tamen... respektu ĝin !
Ĉu eblus starigi regulojn por difini la limojn de tiu venkado?

***2. La adjektivo/adverbo 'necesa/necese'.***
Z. **Por vendisto mensogo°** ... **estas necesa apogo°.** *leugen* *steun*
Apogo por kio?
por la aferoj.
Mensogo konsiderenda° el kies° vidpunkto, tiu de kliento aŭ tiu de vendisto? *te beschouwen uit* *wiens*
Ĉu vere? Ĉu troige?
**Jen komparindaj frazoj:**
Ĉu estas necese, ke oni dormu kviete?
Kio estas necesa por dormi kviete?
Atentu: estas necese **-i**/estas necese, **ke -u**
Estas necese, fari...
Estas necese, ke oni zorgu pri...
Kompletigu laŭplaĉe !

***3. La substantivo 'neceso'.***
Z. **Neceso ne estas** ... **kareso.**
Jen bela rimo. Kion ĝi subkomprenigas?
Neceso ne estas dolĉa afero, ĝi ... skuas° kaj batas°. *schudt en slaat*
ne Z. **Pro ekstrema neceso,** ... **neo ofte iĝas jeso.**
*Uit extreme nood wordt een neen dikwijls een ja.*
Ne Z. **Rekonu necesojn, ne faru ekscesojn**
*Erken noden, maar overdrijf niet.*
Ĉu imageblas kazo por diri tion?
Kiam oni sentas la **neceson** silenti? paroli?

***4. La substantivo 'necesaĵo'.***
Jen bona demando por vojaĝontoj: Kian liston oni nepre° preparu antaŭ (ol) foriri? *absoluut*
la liston de la kunport**endaj** necesaĵoj.
Ĉu ne kelkfoje oni konstatas, ke iuj el tiuj tielnomataj kunportendaj aferoj ne estas vere kunport**indaj**? Certe !
Kiuj estas la necesaĵoj por la vivo?

***4. La substantivo 'neceseco'.***
Z. **Neceseco kontraŭvola estas leĝo malmola.**
*Letterlijk: Ongewilde noodzakelijkheid is een harde wet.*
*Al verzet men zich ook, wet is wet.*
Supozeble ĉiu aprobos° tiun deklaron? *goedkeuren*
Ĉu imageblas ia neceseco dezirata?
Certe tiuj du aspektoj povas koincidi° ! *samenvallen*
Kiel klarigi tiun ideon de 'malmola leĝo'?
Tia leĝo devigas fari malagrablaĵon.
Kiam neceseco ne estas kontraŭvola?
Eble kiam estas klare, ke ĝi helpos?
Ne Z. **Neceseco leĝojn... ne konas.**
*Nood kent wetten niet. (Nood breekt wet).*
Signifo?
En kazo de neceseco kelkfoje oni emas fari ion neleĝan°. *onwettig*

***5. La substantivo 'necesujo'.***
Kien oni metu tiujn necesaĵojn?
en sian necesujon°! *necessaire*
Nesesujo = ujo entenanta° la konstante bezonatajn iletojn° (PIV). *bevattend* *zaakjes*
Necesujo el kio?
el ŝtofo, plasto°, ligno°, ledo°, ktp°. *kaj tiel plu*
*stof, plastic, hout, leder, enz.*
Necesujo por kio?
tualeto, skribado, ludo.
Ĝenerale por kiu?
kudristino, kuracisto, studento...

**La vorteto 'tia'** (verso 1)
Kompletigu: Post **tiaj** laŭdoj/ mallaŭdoj mi estis en **tia** stato, **ke...**
Z. **Kia naskiĝis, tia** ... **grandiĝis.**
Z. **Kia oni vin vidas, tia... oni vin taksas°.** *inschatten*
Sekvo?
Oni prizorgu sian aspekton. Oni ne aspektu tro malsane, mizere, distrite°. *verstrooid*
Jen proverbeto dirinda al kia homo?
Al iu, kiu neglektas sian aspekton, sian eksteraĵon.
Z. **Kia pago, tia** ... **ago.**
Kiam tio ne veras?
Ekzemple kaze de idealisto? entuziasmulo?

**Fiere** (verso 3)
Z. **Antaŭ vespero ne estu fiera. =?**
Ne hastu tro por ... paradi.
Z. **Fiera mieno, kapo malplena.**
Dirinda pri kia persono?
Pri iu, kiu ne estas ege inteligenta sed kiu tamen

aspektas ege fiera pri si mem.
Z. **Ofte kantas la buŝo, kiam ploras la koro.**
Alivorte ?
Ies ekstera konduto ne ĉiam informas…
pri ties psika stato.
Z. **Pro homo fiera ĝojas infero.**
Kiam laŭdire la infero ĝojas?
Verŝajne kiam ĝi ricevas multe da loĝantoj.
Kial ĝi ĝojus pro homo fiera?
Ĉu eble ĉar fiera homo certe iam kulpis kaj do meritos iri en inferon?
Z. **Riĉeco estas frato de fiereco.**
Frato en kiu senso?
Ke ekzistas ia ligo inter ili, ke ili bone kaj ofte iras kune. Ekzemple ?
Riĉuloj ofte ŝatas paradi pro sia riĉeco, ili nur malofte estas modestaj.
Notindas aliflanke ke, se ili tion ne faras, ne tiom paradas, oni emas diri, ke ili estas … kaŝemaj°, kaŝemuloj°. *stiekem; stiekemerds*

Vana (verso 4)
Jen ekzemploj de vanaj agoj laŭ Z.
**El malplena telero…  vane ĉerpas kulero.**
*Uit een leeg bord schept een lepel tevergeefs.*
Dirinda ekzemple en kia situacio? Alivorte?
Ĉe povrulo° ne ŝtelu. *arme*
**Al kavo senfunda…  ŝtopado ne helpas.**
*Bij een bodemloze kuil helpt dichtmaken niet.*
Do: oni ne provu fari ion, kiam oni scias, ke … tio estos neutila aŭ vana.
**Ĉerpi akvon per …  kribrilo.**
*Water scheppen met een zeef.*
**Bruo potenca,…  nula esenco.**
*Machtig lawaai, nul essentie (inhoud).*
*Veel geblaat en weinig wol.*
Ĉu vi, kara leganto, iam havis okazon diri tion?
**Celi anseron°, trafi…  aeron.**
*Mikken op een gans, de lucht raken.*
Jen bela poezia maniero por diri malsukcesi !
**Atendi sur tero, ĝis … sekiĝos la rivero.**
*Op de grond wachten tot de rivier zal uitdrogen.*
Kelkfoje necesas atendi ege longe. Jen kiel diri tion poezie.

Ĉarma bel' (verso 5)
Z. **Al loko dolora ni …  manon etendas,**
**al loko ĉarma…  okulojn ni sendas.**
*Naar een pijnlijke plaats, de hand strekken wij,*
*naar een bekoorlijke plaats, de ogen richten wij.*
Pri kiaj lokoj povas temi ?
Kaj krome° pri kies° lokoj temas? *bovendien; van wie*

Z. **Ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme.**
*Overal is het warm, maar thuis is 't het meest bekoorlijk.*
*Zoals het klokje thuis tikt, tikt het nergens.*
Ĉu jen realo aŭ revo?
Z. **Ĉio transmara estas ĉarma kaj kara.**
*Alles van overzee is charmant en dierbaar.*
*Het gras is altijd groener aan de andere kant van de heuvel.*
Ĉu jen pensita admire aŭ ironie?
Kiaj homoj dirus tion?
Tiaj kiuj ne kontentiĝas pri tio, kion ili havas.

Fajro.(verso 9).
Z. **El flamo sin eltiris, en ...fajron eniris.**
*Uit de vlammen trok hij zich terug, in het vuur ging hij.*
*Van de regen in de drup.*
Direbla pri kia homo?
Pri iu, kiu eskapis el problemoj kaj falis… en pli grandajn.
Z. **Se neĝas sur la monto,**
**estas malvarme en la valo.**=?
Ĉu jen figura- aŭ proprasence?
Simplaj homoj spertas, kiam altranguloj … havas problemojn..

**TRADUKEKZERCOJ**
Antaŭa. 1) Kiam oni diras pri iu, ke li estas en la nuboj? Kiam li estas ravita. 2) Mevoj estas fortike konstruitaj naĝ(o)birdoj kun longaj flugiloj. 3) La griza mevo aŭ malgranda mevo retroviĝas ĉe kalma (trankvila) vetero sur la marbordo, sed ĉe alvenanta (alproksimiĝanta) malbona vetero ĝi reflugas enlanden kaj tial estas rigardata kiel antaŭsigno de malbona/aĉa vetero. 4) Ĉio jubilas. Ĉio eligas ĝojkriojn. Jubilante oni esprimas/ montras sian ĝojon. 5) Petoli tra la vivo estas vivi entuziasme kaj sen zorgoj (senzorge). 6) Longa malsan(ec)o aŭ peniga transloĝiĝo povas iun tute elĉerpi. 7) La juna knabo migras/ vagas/vagabondas tra la stratoj. 8) Konsulti la flugon de la birdoj. Ĉe la prauloj rimedo por antaŭdiri la estonton.
Nova. 1) Bij gebrek aan brood is de schaamte dood. *Uit nood doet men veel, dat men liever naliet.* 2) Vruchteloosheid, de vrees der vergeefsheid spaart niet één. (Van Eeden). 3) Een idylle is de dichterlijke schildering van het leven van eenvoudige, onbedorven mensen, die in nauwe betrekking met de natuur verkeren. 4) De weg naar de hel is met goede voornemens geplaveid. *Talloze goede voornemens worden nooit gerealiseerd.* 5) De worm der jaloezie knaagt aan zijn hart. 6) Luchtkastelen eisen hoge onderhoudskosten. (E. B. Lytton).
Em. Van Damme



elkreskinta al unu el la plej gravaj konservad-bibliotekoj en Flandrujo. Ĝi estiĝis moderna, komforta instituto kun reta katalogo (2): la tuta kolekto estas konsultebla ekde hejme. Ĝi fariĝis scienca konservad-biblioteko pri la homaj sciencoj ĝenerale kaj de la flandra kultura heredaĵo speciale. Por klarigi la profilon de la biblioteko rilate al la eksteruloj, en 2008 ĝi ŝanĝiĝis laŭnome. Ekde tiam la Urba Biblioteko Antverpeno nomiĝis la Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience.

## 2. Konstruaĵo

### 2.1. Sodaliteit

La historio de la Sodaliteit [Sodalitejt], la impona konstruaĵo en la Placo Hendrik Conscience, retroiris al la 17-a jarcento. Post la konstruado, en 1621 de la preĝejo Karolo Boromeo, la jezuitoj fondis diversajn fratecojn, nomitajn sodaliteiten. Por tiuj fratecoj, kontraŭe de la preĝejo, duetaĝa konstruaĵo estis starigita, en kiu du preĝejetoj estis establataj. Post la abolo de la jezuitoj-ordeno en 1773, la konstruaĵo estis uzata por diversaj aktivecoj, interalie kiel kafejo kaj dancejo. Sur la muro je la Wijngaardstraat oni ĉiam povas legi la malnovan nomon *Café Moortgat*.
En 1879 la urba estraro de Antverpeno aĉetis la konstruaĵon, kiu ĉiam estas nomata la Sodaliteit, por tie loĝigi la urban bibliotekon. Je tiu momento tiu ĉi ankoraŭ troviĝis en la urba domo, sed la spaco estis estiĝinta tro malgranda por la kreskinta kolekto. La urba estraro alikonstruigis la Sodaliteit. En 1881 la nomo de la Placo de la Jezuitoj, situinta antaŭe de la Sodaliteit, ŝanĝiĝis en Placon Hendrik Conscience, kaj la 13-an de aŭgusto 1883 la nova biblioteko-konstruaĵo estis malfermata kaj la bronza statuo de Hendrik Conscience, antaŭ la enirejo, estis inaŭgurata. Tiam la konstruaĵo gastigis kaj la Urban Bibliotekon kaj la Popolan Bibliotekon, kiu estis atingebla per aparta eniro je la angulo kun la Wijngaardstraat. Post kelkaj jaroj ankaŭ la Sodaliteit estis estinta tro malgranda por la kreskantaj biblioteko-kolektoj, kaj jam en 1895 la Popola Biblioteko transloĝiĝis al la Blindestraat.
Nun la Urba Biblioteko povis uzi la tutan spacon de la Sodaliteit. Sed post iom da tempo ankaŭ la Urba Biblioteko ne plu disponis pri la necesa spaco, kaj oni decidis plu plivastigi ĝin. Dum la remalfermo en 1936 la legejo, la administracio kaj tri etaĝoj de novaj magazenoj estis loĝigataj en la renovigitan konstruaĵon en la Placo Hendrik Conscience numero 4, la iama monaĥejo de la jezuitoj. La malnova legejo je la teretaĝo de la Sodaliteit estis anstataŭata de du etaĝoj da magazenoj, kaj en la tria etaĝo la Salono Nottebohm estis establata.

### 2.2. Salono Nottebohm

Ekde 1933 la malnova legejo en la Sodaliteit estis transformata en du etaĝojn de libromagazenoj, super kiuj la Salono Nottebohm estis aranĝata kiel spaco por ekspozicioj, prelegoj kaj kiel magazenspaco por muzeaj objektoj. La salono obtenis sian nomon de la Urbestraro kiel dankema rememoro de Oscar Nottebohm, komercisto de germana origino, kiu socie kaj kulture estis grava mecenato por la Urbo Antverpeno. Je lia morto en 1935 li testamentis gravan financan donacon al la Urba Biblioteko.
La Salono Nottebohm estas ne nur biblioteko-magazeno kaj ekspoziciospaco, sed ankaŭ konservejo de iom da pinto-objektoj el la kolekto de Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience. Tiele ĝi gastigas la faman egiptan ŝrankon, la ĉiel- kaj terglobuson de Willem kaj Joan Blaeu, kaj diversajn bustojn de eŭropaj aŭtoroj.

### 2.3. Korte Nieuwstraat

Sed post kelka tempo ankaŭ la renovigita biblioteko de 1936 montriĝis tro malgranda por la ĉiam kreskanta kolekto. Dum la 1960-aj jaroj la granda kolekto de revuoj transloĝiĝis al akcesora konstruaĵo en la Minderbroedersrui. En 1996 novaj magazenoj kaj nova publik-enirejo estis konstruataj je la Korte Nieuwstraat. Samtempe la legejo estis ĝisfunde renovigata. Danke al la plia magazen-spaco la revuokolekto denove povis esti lokumata en la precipan konstruaĵon de la biblioteko.

### 2.4. Legejo

La moderna legejo alirigas la fascinajn kolektojn de la heredaĵbiblioteko. Helpe de la aŭtomatigita katalogo oni trovas la tutan havaĵon de la biblioteko. La Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience ne pruntedonas librojn. Ja la verkoj estas konsulteblaj en la legejo. Multaj malnovaj gazetoj estas legeblaj mikrofilme. En la legejo mem oni trovas la nunajn jarkolektojn de proksimume cent revuoj. La salono estas provizata per vestejo, diversaj fotokopiiloj, konektoj por tekokomputiloj kaj vifio.

## 3. Kolektoj

### 3.1. Nederlandlingva Literaturo

La Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience sisteme kolektas ĉiujn originalajn publikigaĵojn de flandraj kaj nederlandaj aŭtoroj laŭ la diferencaj literaturaj genroj (prozo, poezio, teatro, eseo, bildliteraturo), ĉiujn eldonaĵojn kaj tradukaĵojn de la literatura verkaro de flandraj aŭtoroj, inklude de verkaro kiu ne estas disvastigita per la komerca retaĵo: poemaroj aŭtore eldonitaj, bibliofiliaĵoj… Ankaŭ verkoj pri la historio de la nederlandlingva literaturo, priliteraturaj studoj kaj literatura kritiko estas kolektataj.

### *3.2. Porjunula literaturo: kunlaboro kun Fondaĵo Legado*

Koncerne la flandra porjunula literaturo la ĉeestanta, ampleksa kolekto estas kompletigata per la kolektoj de la tiama Nacia Centro pri la Porjunula Literaturo (Nationaal Centrum voor de Jeugdliteratuur), nuntempe parto de la Fondaĵo Legado (Stichting Lezen). Konforme al la kolekto-interkonsentoj kun Stichting Lezen / Focuspunt Jeugdliteratuur la Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience kolektas la flandran porjunulan literaturon aperintan antaŭ 1976. Porjunulaj libroj el Nederlando estas kolektataj laŭokaze, konsekvence nekomplete.

### *3.3. Historio de Flandrujo*

La Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience kolektas ĉion kio aperas/aperis pri la historio de Flandrujo: sendepende de la epoko aŭ la geografiaj ŝanĝoj (Burgonjaj Nederlandoj, Franca Flandrujo, Unuiĝintaj Nederlandoj...), "kaj politika historio kaj socia kaj ekonomia historio, eklezia historio, arĥeologio, biografio, genealogio, heraldiko, kartografio... (larĝe interpretita), la historio de la Flandra Movado laŭ ĉiuj ĝiaj aspektoj, komponantoj kaj formoj (prilingva batalo, nacia konsciigo, spirita kaj materiala disvolviĝo) ekde la komenco (1830 kun fruaj antaŭvenintoj en la 18-a jarcento) ĝis la pasintaj jardekoj kun la politika memstariĝo de Flandrujo. Ankaŭ vojaĝlibroj pri Flandrujo estas kolektataj.

### *3.4. Flandra popolkulturo kaj regionografio*

Publikigaĵoj pri flandra folkloro kaj regionografio estas sisteme akirataj. Ofte temas pri (lokaj) studoj publikigitaj de priregionografiaj aŭ prihistoriaj socie-toj, komunumo-estraroj, dokumentarcentroj, muzeoj, arĥivoj... La Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience kontraktis kunlaborinterkonsenton kun Regionografio Flandrujo (Heemkunde Vlaanderen vzw). Kaj la flandraj kaj la provincaj kunigaj organizaĵoj transmetis siajn revuokolektojn al la Heredaĵbiblioteko. Ekde 2004 ĉiuj aliĝintaj priregionografiaj societoj senpage deponas sian propran revuon en la Heredaĵbibliotekon Hendrik Conscience.

### *3.5. Arto en Flandrujo*

Ampleksas verkojn pri arto kaj arthistorio, limigitaj kaj kronologie kaj laŭ fako. Temas pri vastaj prihistoriaj sinoptikaj verkoj, monografioj kaj *catalogues raisonnés* (inventaroj de la verkoj de artisto) pri individuaj artistoj, katalogoj de ekspozicioj kaj de muzeoj, kaj tio pri la artosferoj kiaj pentrarto, desegnarto, skulptarto, arĥitekturo, fotografio, filmarto, danco kaj aplikataj artoj.

Krome oni havas la originalajn verkojn al kiuj flandraj artistoj (precipe kiel ilustristoj) kunlaboris, ofte ankaŭ publikigitaj kiel bibliofiliaj (altvaloraj) eldonaĵoj.

### 3.6. Librohistorio

Ampleksas verkojn pri la historio de la libro ĝenerale (skribsistemo, manuskriptoj...), la presarto, laŭenhave same kiel nuraj teĥnikaj kaj historiaj aspektoj, geografie precipe, sed ne ekluzive limigitaj al Eŭropo, kun vidpunktoj kiaj tipografio, librokovriloj, ilustraĵteĥnikoj, paperstudo, libroprizorgado, eldonejhistorio, librokomerco, bibliotekoj, kolektistoj, ĵurnalistaro kaj bibliofiliaj eldonaĵoj.

### *3.7. Antverpenaĵoj*

La Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience sisteme kolektas ĉiujn Antverpenaĵojn. Temas pri historiaj studoj pri Antverpeno, unuaranga fontomaterialo kiaj publikigaĵoj eldonitaj okaze de antverpenaj eventoj (paradoj, festoj, ekspozicioj, rememoroj...), publikigaĵo de antverpenaj eldonistoj larĝsignife.

### *3.8. Malnovaj presaĵoj*

La Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience mastrumas gravan kolekton de malnovaj presaĵoj (libroj eldonitaj antaŭ 1830), grandaparte historie alkreskinta dum kvin jarcentoj. La kolekto ĉiam pligrandigas danke al donacoj (inter alie pere de la Donac-fonduso por Libro kaj Literaturo) kaj aĉetaĵoj. La eksterordinara amplekso de la kolekto samtempe diversigas ties specifan enhavon: historio, literaturo, arto, scienco, religio … Ĉiuj kampoj de la malnova libro ĉeestas en ĉiuj siaj formoj de apero: pamfletoj, atlasoj, emblemlibroj, efemeraj presaĵoj (almanako, procirkonstancaj poemoj…), ilustritaj verkoj, muzikverkoj k.t.p. Ankaŭ manuskriptoj el la deka ĝis la dek-unua jarcento troviĝas en la kolekto.

La pezocentro de la kolekto estas Antverpeno, kun verkoj pri la historio de la urbo kaj regiono, antverpenaj aŭtoroj kaj antverpenaj presaĵoj, senkonsidere la enhavo. Tiu pezocentro estas la plej grava kriterio por la akiro de malnovaj presaĵoj, kondiĉe ke la akiro de eldonaĵoj de Christoffel Plantijn aŭ de liaj sekvantoj, la Moretus-oj, estas la afero de la Muzeo Plantin-Moretus, kaj verkoj kiuj jam ĉeestas en aliaj publikaj antverpenaj kolektoj, ne estas denove aĉetataj.

### *3.9. Esperanto-kolekto*

La Urba Popola Biblioteko en la Blindenstraat jam posedis Esperanto-fakon ekde 1907, kaj ĝi organizis dum la Universala Kongreso de 1928 ekspozicion de libroj en Esperanto (4).

Ĝis freŝdate la Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience posedis nur ĉirkaŭ 500 esperantlingvajn publikigaĵojn, krom ĉirkaŭ 200 diverslingvaj libroj pri Esperanto. La 30-an de majo 2016 la Antverpena Komunuma Konsilantaro aprobis kunlabor-interkonsenton inter unuflanke la Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience kaj aliflanke Flandra Esperanto-Ligo vzw (3). Tiele, tiu ĉi donacis la plej grandan parton de sia propra biblioteko kondiĉe ke la koncernaj libroj estu por ĉiam konservataj en la Heredaĵbiblioteko kiel aparta kolekto nomita "Flandra Esperanto-Biblioteko". Post realigo de la katalogo, pluraj miloj da Esperanto-libroj estos disponeblaj por la publiko kaj por la scienca esplorado.

### 4. Donaco-fonduso por Libro kaj Literaturo

La Donaco-fonduso por Libro kaj Literaturo (nederlande: Dotatiefonds voor Boek en Letteren) estas la amikarasocio de la Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience kaj de la Domo de la Literaturo (Letterenhuis). Ĝi celas entuziasmigi la publikon por la literatura heredaĵo. Tiele la asocio daŭrigas la jarcentaĝan tradicion per kiu la civitanoj ludas la rolon de mecenatoj por konservi la skribitan heredaĵon por la estonteco. Helpe de la libro- kaj literaturo-interesiĝantoj oni sukcesis aĉeti en la pasinteco belegajn kolektojn kaj maloftajn ekzemplerojn kiuj estas konservataj en la Heredaĵbiblioteko Hendrik Conscience kaj en la Domo de la Literaturo.

### 5. Referencoj

(1) La leĝa bazo estas: Decreet van 23 mei 2008 houdende de ontwikkeling, de organisatie en de subsidiëring van het Vlaams cultureel-erfgoedbeleid.

(2) http://anet.ua.ac.be/desktop/ehc Senpera aligilo al la cifereca katalogo

(3) Gemeenteraad Antwerpen, zitting van 30 mei 2016: Cultuur, Musea en Erfgoed, Erfgoedbibliotheek Hendrik Conscience, Samenwerkingsovereenkomst Vlaamse Esperantobond v.z.w., 6 blz.

(4) 1928: 20a Universala Kongreso de Esperanto kaj 4a Somera Universitato en Esperanto, Antverpeno, Kongreslibro, p. 27

### 6. Bibliografio


* Wikipedia (21/09/2016)
* Stadsbibliotheek Antwerpen 1985: Vijf eeuwen Stadsbibliotheek
* Stadsbibliotheek Antwerpen 1993: De Nottebohmzaal. Boek en Mecenaat
* Stadsbibliotheek Antwerpen 2005: Zichtbaar zeldzaam: hoogtepunten uit de Antwerpse Stadsbibliotheek
* Erfgoedbibliotheek Hendrik Conscience 2011: Nottebohm revisited


### 7. Eksteraj ligiloj

- http://www.consciencebibliotheek.be Oficiala reta paĝaro de la Erfgoedbibliotheek Hendrik Conscience"



# LABA DIENA LITOVIO 52-aj BALTIAJ ESPERANTO TAGOJ

Ni estis tricentope en la verda kaj kvieta bankuracejo Birstonas. Esperantistoj el ĉefe la Baltiaj Ŝtatoj kaj ĉirkaŭantaj landoj. Ĉiuj aĝoj, ĉiaj diversaj homoj, kvin el Belgio. Kelkaj konatoj kaj multaj novaj vizaĝoj, agrable.

La Baltiaj Esperanto-Tagoj estas organizataj ĉiujare, laŭvice en unu el la tri Baltiaj Ŝtatoj.

Antaŭtagmeze estis Someruniversitato, prizorgita de universitatuloj. Mi sekvis altnivelan serion pri la historio de la judaismo. Estis ankaŭ serioj pri Litovio en diversaj aspektoj; fabeloj kaj iliaj signifoj en la hodiaŭa tago; sekureco en la sociaj medioj, ktp. En la loka lernejo oni povis sekvi kursojn pri Esperanto en diversaj niveloj. Posttagmeze estis prelegantoj kiuj ofertis interesan aron de temoj. Ekskursotago estis al tipaj bienoj, mieltrinkaĵ-produktejo kaj boatvojaĝo.

Litovio kaj precipe Birstonas estas verdaj kaj kvietaj. Preskaŭ ne estas reklamoj aŭ murdesegnoj, preskaŭ ne estas tiu ĉiama muziko, kaj pro la malgranda kvanto de homoj ankaŭ estas kvieteco en la stratoj. Por ni estis bona okazaĵo eklerni nekonatan angulon de Eŭropo kaj ekkonatiĝi homojn kun kiuj ni alimaniere ne renkontus.

Loĝado estis en lokoj laŭ elekto. Kurachotelo el la sovieta tempo; tre moderna hotelo kun naĝejo kaj trinkeja teraso sur la tegmento kun panoramo al la rivero (ni!) aŭ ĉe privataj personoj en tipaj somerdomoj. Ni renkontis surstrate, la Esperantistoj, estis agrable.

La 6-an de julio, la Nacia Festotago de Litovio, ĉiuj Litovoj en la tuta mondo kantas la himnon je la 21-a horo. Kiel Esperantistoj ni partoprenis la komunan kantadon en Birstonas, apud la urbestrino, kantante esperantlingvan version.

Bone organizita kunveno, multaj eblecoj ekkoni homojn, havi kontaktojn, multaj homoj kiuj ege bone parolas Esperanton, interesaj temoj kiuj estas prezentitaj plenkvalite. Mezgranda kunveno estas la plej bona loko por renkonto, por sencoplene okupi sin. Mi konsilas ĝin al vi!

Julio 2017 Latvio estas jam en mia agendo, la 53-aj BET. Ĉu vi ankaŭ venos?

Desiree Derksen, Patrick Haerick

# ESPERANTO STUDIEWEEKEND STEVENSBEEK (NIJMEGEN) 3-5 MAART 2017

***Voor wie?*** Als je nog nooit Esperanto hebt geleerd, of jouw Esperanto is nog niet zo goed als je zou willen, ben je van harte welkom. Er wordt op verschillende niveaus lesgegeven. Het oefenen van het spreken komt zeker ook aan bod.

***Wanneer?*** Het volgende studieweekend vindt plaats van vrijdagavond 3 maart t/m zondagmiddag 5 maart 2017, in 't Koetshuis van de Stevenshof te Stevensbeek (ten zuiden van Nijmegen).

De ***kosten*** voor dit studieweekend bedragen € 75,- p.p. (leden van Esperanto Nederland en FEL € 65,-). In de prijs zijn inbegrepen: lessen, het overige programma, overnachtingen, maaltijden, koffie en thee tussen de lessen.

Informatie? Meer informatie en het aanmeldingsformulier op de website van Esperanto Nederland. http://esperanto-nederland.nl/ned/studieweekend.php



# 150 JAAR H.G. WELLS ESPERANTOVERTALINGEN

Op 21 september 1866 werd de Britse schrijver H.G. Wells geboren, wellicht de eerste grote sciencefictionauteur. Hij is vooral bekend geworden met de later ook verfilmde romans *The War of the Worlds* en *The Time Machine*. Bij de Vlaamse Esperantobond vindt u drie vertalingen van zijn boeken: *La dormanto vekiĝas*, *La lando de la blinduloj* en *La Tempo-maŝino*. Meer details op www.retbutiko.net.

pri **"Lando de la Blinduloj"**

Eldonejo Bero, en sia *Serio utopia*, reeldonis ĉi tiun kuriozan novelon de H.G. Wells. Konforme al la tradicia strukturo de rakontoj pri fantaziaj landoj Wells komencas per priskribo de mirinda, kaŝita, monta landeto en Andoj, kiu, pro natura katastrofo, estis apartigita disde la cetera kontinento, tiel ke neniu povis eniri, nek eliri. La landeto konsistis el tre fekunda valo, kun preskaŭ ĉio bezonata por la vivo. Sed mistera malsano atakis la malgrandnombran loĝantaron de tiu landeto, tiel ke la vidpovo de ĉiuj homoj malfortiĝis, iliaj idoj naskiĝis blindaj, kaj fine ĉio, rilatanta al la kapablo vidi, estis forgesita. Kompense pro la blindeco la aliaj sensoj de la loĝantoj akriĝis. Ilia kapablo palpi, aŭdi eĉ plej etajn sonojn, flari ktp estas nekredeble granda.







Montogrimpisto trafalas neĝfendegon kaj post multa peno trovas sin en la lando de la blinduloj. Tie la geloĝantoj konvinkiĝas, ke li estas freneza, pro lia konstanta parolado pri "vido". Kaj, malgraŭ multaj provoj fare de li, montriĝas, ke ili, per siaj akraj sensoj, povas superi lian vidpercepton.

Iom post iom li enamiĝas al knabino, kies bela aspekto egalas al ŝia karaktera beleco. Ili volas geedziĝi. Sed oni postulas, ke por ke tio estu ebla, li devos esti blindigita. Kontraŭvole li konsentas.

Tamen, preskaŭ lastmomente, la beleco de la naturo, de la montoj, de la ĉielo, bedaŭrigas lin pri lia konsento. Li eskapas, reiras al la civilizacio kaj miras pro sia iama preto akcepti blindiĝon.

"Utopieca" estas tiu Lando de la Blinduloj nur tiusence, ke malgraŭ sia plena blindeco la loĝantoj de tiu lando havas ekspertajn inĝenierojn, konstruistojn, skulptistojn, poetojn, kapablas detale detekti kaj koni direktojn ktp. Ili ankaŭ havas proprajn mitologion, religiemon, imagatan, sed detalan koncepton pri la strukturo de la "universo" (= la fermita valo, en kiu ili loĝas).

La novelo estas tre Wells-eca; kiu amas la sciencfikcion de H.G. Wells, tiu trovos ĉi tiun eldonaĵon salutinda. Ĝi estas tre bone kaj klare presita, kaj komposteraroj maloftas. La etoso de la pensomondo de Wells ĉirkaŭ la jaro 1900 estas tre evidenta.

Donald Broadribb

(el Monato, 2007)



*Algemene Vergadering van de Vlaamse Esperantobond.*

Op 17 september nam La Progreso samen met meer dan 100 verenigingen deel aan de Gentse Cultuurmarkt. Een indrukwekkende menigte kon ons tussen 11 en 17 uur bevragen en kreeg folders toebedeeld.










# CLUBPROGRAMMA'S

Tenzij anders vermeld zijn alle vergaderingen gratis en voor iedereen toegankelijk. Let wel dat de meeste activiteiten in het Esperanto plaatsvinden. Uiteraard zijn we steeds bereid geïnteresseerde bezoekers in het Nederlands te woord te staan.

**ANTWERPEN – La Verda Stelo, Esperanto Antwerpen vzw**
Alle programma's hebben plaats in het *Esperantohuis*,
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, in het clublokaal op de eerste verdieping.
Ĉiun vendredon je la 20 h, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, ankaŭ en julio kaj aŭgusto .
http://esperanto-antwerpen.weebly.com/.
*4/11 Haloween-avond*
Nicky brengt pompoenen en andere materialen mee die de aanwezigen kunnen voorbereiden en versieren om originele haloweenobjecten te maken volgens eigen inspiratie en voorkeur. Men kan ook kinderen meebrengen die graag mee knutselen. En ook zij die niet meedoen kunnen informeel babbelen in een familiale sfeer. Dus iedereen welkom.
*11/11 conversatie-avond*
Ella Strug stelt de reeds uitgevoerde werken in het nieuwe centrum voor met vertoning van foto's.
*18/11 Larysa Osadchuk* (ua) kaj Alain Delmotte Origamio
Aansluitend is er een tentoonstelling. Ik denk dat vele leden reeds een demonstratie van japanners hebben gezien en zelfs een beetje hebben geprobeerd zo te plooien. Maar deze kunst van het papier vouwen heeft zoveel facetten dat we ongetwijfeld weer verbaasd zullen zijn over de mogelijkheden en dat we ervan wat zullen opsteken.
*25/11 Marija Belosevic* (HR) De Kroatische taal en cultuur
*2/12 Leontine Janssens*: zelf mooie wenskaarten maken
*9/12 Rob Keetlaer* Zamenhofa Proverbaro Reta ; Esperanto spreekwoorden in een webstek
*16/12* De club is gesloten wegens een gemeenschappelijk Zamenhoffeest in Oostende

**BRUGGE- Paco kaj Justeco**
Geen samenkomsten voorzien in de komende maanden.
Por pliaj informoj: Heidi Goes, heidi.goes@gmail.com - tel.: 050 / 67 51 78

**BRUSSEL - Fervojisto**
Conversatiecursus - (ook niet-spoorwegmensen welkom). In het gebouw van het Centraal Station, Brussel, Cantersteen 10 - 1ste verdieping studio A
1ste & 3de woensdag van iedere maand telkens van 13.30 tot 15.30 uur

**BRUSSEL – Esperantista Brusela Grupo**
www.esperantobruselo.org
Vergaderplaats: *gebouw Van Maerlant* (hoek van de gelijknamige straat en de Belliardstraat, tegenover het Leopoldpark, dicht bij het metrostation Maalbeek). Elke woensdag van 18 u.30 tot 20 u.00.
Aangezien dit gebouw tot de Europese Instelling behoort, is er een vrij strenge controle. Bezoekers gelieven zich op voorhand aan te melden.
Contact: Françoise Pellegrin

**DILBEEK**
Konversacia rondo, plej ofte la *unuan sabaton* de la monato, *Ontmoetingscentrum Westrand,* Kamerijkstraat 46, 1700 Dilbeek, ekde 14 u.00 ĝis 16 u.00 en salono club 1.
Pro organizaj kialoj bonvolu anonci vin ĉe Lydia Buyst.
Pliaj informoj: Lydia Buyst 054 / 33 01 51; www.westrand.be.

**GENT – La Progreso**
http://www.esperanto/gent
Iedere *vierde vrijdag* van de maand is er een clubvergadering in ons lokaal *La Progreso* , Peter Benoitlaan 117, 9050 Gentbrugge.
Inlichtingen bij Katja Lödör, tel. 19 / 230 16 77 of 09 / 221 10 02.
*vrijdag 25 november*: Lode Van de Velde stelt de Universele schrijftaal BLISS voor. - Vendredon la 25an de novembro: Lode Van de Velde prezentas la Universalan skrib-lingvon BLISS.

**KALMTHOUT- La Erikejo**
http://users.telenet.be/La.Erikejo/index.htm
La kunvenoj de La Erikejo kutime okazas en la Parochiecentrum de Heide, inter la 19h30 kaj la 21h30. Sed venontan decembron estas escepto! De bijeenkomsten van La Erikejo vinden gewoonlijk plaats in het Parochiecentrum van Heide, tussen 19u30 en 21u30. Maar in december zal dat niet zo zijn!.
*Jaŭdo la 17-an de novembro* (2016-11-17), Halovenaĵoj, Esperantlingve prezentotaj fare de la naturdotita rakontistino Nicky. (Tre verŝajne subĉiele en la parkejo kontraŭe de la stacidomo de Heide, ĉirkaŭe de fajrokorbo, provizotaj per bovlo da kukurbosupo.). Halloween vertellingen in het Esperanto gebracht door geboren vertelster Nicky. (Hoogstwaarschijnlijk buiten op de parking tegenover het station van Heide en dan rond een vuurkorf met een kom pompoensoep erbij.)
*Sabato la 17-an de decembro (2016-12-17)*,Ni ne kunvenas en la kutima ejo la trian ĵaŭdon de decembro sed ni festos kune kun la belga esperantistaro sabaton la 17-an de decembro 2016 je la 12-a horo en Ostendo, "De Boeie", Kerkstraat 35 (8-minuta promenado ekde la stacidomo). In december vergaderen we niet op de gebruikelijke datum en plaats, maar we zullen deelnemen samen met heel wat landgenoten-esperantisten aan het Zamenhoffeest te Oostende, "De Boeie", Kerkstraat 35 (op 8 minuten wandelen van het station) , op zaterdag 17 december 2016

**KORTRIJK- Koninklijke Esperantogroep La Konkordo**
www.esperanto-kortrijk.info.
Maandelijkse bijeenkomst in Erfgoedhuis, zaal Lessius, eerste verdieping, O.L.Vrouwstraat 45, Kortrijk (tel. 056 / 27 74 24) elke vierde dinsdag van de maand van 19 u.30 tot 21 u.30. Indien de vierde dinsdag een feestdag is, dan op de derde dinsdag.
Contact via e-mail piet.glorieux@gmail.com en esperantokortrijk@hotmail.com.

**LEUVEN – Vespero 3000**
http://www.esperanto.be/esperanto3000.
De bijeenkomsten hebben elke tweede woensdag van de maand plaats in het Cultureel Centrum. Romaanse Poort, Brusselsestraat 63 , 3000 Leuven, vanaf 19 u.45; de lezingen beginnen om 20 u.00.

**OOSTENDE -La Konko**
Gespreksnamiddag elke maandag 14u30 - 16u30 in Ontmoetingscentrum De Boeie, Kerkstraat 35
Gespreksavonden: maandag 14 nov en 12 dec
Pliaj informoj: Marc Cuffez (flandrio@hotmail.be) aof 0486/362365 ('s avonds) of Flory Witdoeckt (flory2@witdoeckt.be) of www.lakonko.be.
*Maandag 28 nov* om 17u: Voordracht "Langs de mooiste rivier van China" door Marc
*Zaterdag 17 dec* om 12u: Nationaal Zamenhoffeest in OC De Boeie

**PEER -Limburga esperanto-Asocio**
De Limburgse Esperanto Vereniging (LEV) organiseert volgende activiteiten:
*24 nov 20 u.*: 'Oekraine' Ben Indesteeghe en Hati
*26 en 27 nov* van 10 - 18 u. deelname Esperanto-infostand op Wereldbeurs 'Couleur Foyer' in BICC Cultuurcentrum 't Poorthuis, Zuidervest 2A Peer
*15 dec* 19 u. Zamenhof-feest (Taverne 'Torenhuis' Kerkstraat Peer
*17 dec:* Deelname aan Zamenhof-feest in Oostende

**TIENEN – La Hirundo**
htttp://www.lahirundo.be
Info: Bert Boon, Merelhof 8, 3300 Tienen,tel.: 016 / 81 52 46,
bert.boon@skynet.be of post@lahirundo.be

**VERDAJ SKOLTOJ**
www.verdajskoltoj.net
Esperanto-staĝo por 10-16 jaraĝuloj: 3-9 aprilo 2016, Bouillon
informoj: Valère DOUMONT 0485/517552 info@verdajskoltoj.net

ISSN - 0772 - 540 afgiftekantoor Antwerpen X
Tweemaandelijks tijdschrift
p/a Vlaamse Esperantobond 140
2000 Antwerpen

## Contactadressen in Nederland

http://www.esperanto-nederland.nl/ned/regionale-groepen.php

**ALKMAAR**
Marijke Lathouwers, Kruiszwin 1205 NL-1788 LE Den Helder
tel. +31(0)223-643781, esperanto.alkmaar@gmail.com

**EINDHOVEN**
Jeannette Bosse Veld, Montgomerylaan 361 NL-5612 BH Eindhoven,
tel.+31(0)402 113 344, jeannette.bosse@tiscali.nl

**NOORD-NEDERLAND**
Nelly Kiel-Klunder, G. Sterringastraat 60 NL-9728 VV Groningen,
tel. +31(0)505 251 436, nrkielklunder@hotmail.com

**HAARLEM**
Corrie Kwantes, Marnixstraat 57 NL-2023 RB Haarlem,
tel. +31(0)235 276 561

**HELMOND**
Toine Gremmen, Nassaustraat 3 NL-5707 HL Helmond,
tel. +31(0)492 544 472, info@twangremmen.nl

**NIJMEGEN**
*Klubo Zamenhof* ,Jan Bemelmans, Zwanenveld 2287
NL-6538 PS Nijmegen, tel. +31(0)243 882 926

## Andere nuttige adressen

**Vlaamse Esperantobond / Flandra EsperantoLigo**
Frankrijklei, 140, B- 2000 Antwerpen, tel. 03 / 234 34 00
info@fel.esperanto.be, www.esperanto.be

**ILEI-Belgio (Esperanto leraars)**: Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, 8400 Oostende,
tel.: 0486 / 36 23 65, marc.cuffez@telenet.be

**Esperanto Scoutsvereniging/Skolta EsperantoLigo (SEL)**
Stein Hautekees, Rue des Rèches 20, B-5530 Yvoir,
post@sel-belgio.be , www.sel-belgio.be

**Verdaj Skoltoj**
ruelle de Thuin 20, B-6540 Lobbes, tel. 071 / 16 53 95 kaj 0485 / 517 552
info@verdajskoltoj.net, www.verdajskoltoj.net

**Association pour l'Esperanto**,
p/a Marcel Delforge, rue des Glacières 16, B6001 Charleroi (Marcinelle), tel. + fax:
071 / 43 14 13, mardelforge@brutele.be, http://esperanto-wallonie.be/

**Belga Esperanto Fervojista Asocio (Spoorwegesperantisten)**,
Lucien De Sutter, Stockholmstraat 49 bus 2, 8400 Oostende,
tel. 059 / 50 18 25

**Esperanto Nederland,** secretaris, p/a Ineke Emmelkamp
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen, tel. 050 / 571 88 42,
info@esperanto-info.nl

**Hoofdkantoor van de Esperanto WereldVereniging/Centra Oficejo de UEA**
Nieuwe Binnenweg 176, NL3015 BJ Rotterdam,
tel.: 00 31 / 10 436 10 44, uea@inter.nl.net

## Bestuursleden van FEL

| | |
|---|---|
| *Voorzitter*: | Ivo Vercammen |
| *Ondervoorzitter*: | André Staes |
| *Secretaris:* | Nicky Janssen |
| *Penningmeester:* | Marc Cuffez |
| *Bestuursleden:* | Griet Symoens, Cyreen Knockaert, Eddy Van den Bosch<br>Henri Schutters |

## Contactadressen in Vlaanderen

**ANTWERPEN**
Esperanto-Antwerpen, p/a Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen,
tel. 03 / 234 34 00, esperanto-antwerpen@esperanto.be
*La Verda Stelo*: jakvoschram@telenet.be

**BRUGGE**
*Paco kaj justeco*, Heidi Goes, Assebroeklaan 2, 8310 Brugge,
tel. 050 / 67 51 78, heidi.goes@gmail.com

**BRUSSEL**
Françoise Pellegrin, Eiklaan 14, 1640 St-Genesius-Rode,
fransuaz@esperantobruselo.org, tel. +32 2 358 27 28
Laurent Loisse, Tir-aux-Pigeons 95 1150 Bruxelles,
tel. 02 / 770 11 71, sekretario@esperantobruselo.org

**GENT**
*La Progreso,* Katja Lödör, Peter Benoitlaan 117, 9050 Gentbrugge,
tel. 09 / 230 16 77, gent@esperanto.be

**KALMTHOUT**
*La Erikejo*, Mireille Smet-Storms, Dogulaslaan 14, 2950 Kapellen,
tel.: 03 / 666 83 19, mireillestorms@hotmail.com

**KORTRIJK**
*La Konkordo*, Piet Glorieux, Pastoor Blanckestraat 8 bus 0201,
8610 Kortemark,
tel.: 051 / 62 39 28, piet.glorieux@gmail.com,
Jean-Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk,
tel. 056 20 07 96, esperantokortrijk@hotmail.com

**LEUVEN**
*Esperanto 3000*, Roger Goris, Rue Ménadastraat 44, 1320 Hamme-Mille,
tel. 010 / 86 01 12, goris.r@skynet.be

**LIMBURG**
*Limburgse Esperantovereniging*
Henri Schutters, Panhovenstraat 10, 3930 Peer,
tel. 011 / 63 55 92, henri.schutters@skynet.be

**DILBEEK**
Lydia Buyst, tel. 054 / 33 01 51, lydia.buyst@scarlet.be

**OOSTENDE**
*La Konko*, Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, 8400 Oostende,
tel. 0486 / 36 23 65 (gsm), marc.cuffez@telenet.be

**ROESELARE / TIELT** zie **KORTRIJK**

**TIENEN**
*La Hirundo* <http://www.lahirundo.be> Info: Bert Boon,
Merelhof 8, 3300 Tienen, tel. en fax: 016 / 81 52 46, post@lahirundo.be
Bijeenkomst (Vespero): elke laatste maandag van de maand (behalve juli en
augustus). Programma op aanvraag.
Info: Bert Boon, Merelhof 8, 3300 Tienen.

**TURNHOUT**
Maria Dom, Tuinbouwstraat 14, 2300 Turnhout,
tel. 014 / 41 72 92, de.groot-dom@telenet.be

**Met steun van de Vlaamse Gemeenschap: giften van minstens 40 euro zijn fiscaal aftrekbaar van belastbaar inkomen**